

Reformo de la esperanto-instruado, 8-a parto
Claude Gacond, 183-a radioprelego, 1967.04.12 & 1967.04.15

Cl.- Atentu esperantistoj! Ĉi tie vi aŭdas la Svisan Kurtondan Radiostacion. Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Ni hodiaŭ konkludas nian preleg-serion, kiun ni dediĉis al la instruado de nia lingvo.

A.- Vi konstatis, ke ĝenerale la lernolibroj ne plu estas adaptitaj al la modernaj bezonoj. Ili celas kolektivitan instruadon, dum la statistikoj pruvas, ke la esperantistoj aŭtodidakte lernas la lingvon. La lernolibroj ĉefe kapabligas legi, dum la lernantoj deziras povi tuj paroli la lingvon.

Cl.- La instruado de esperanto evoluas malpli rapide, ol la instruado de la naciaj lingvoj, ĉar la lingvo internacia malofte estas lerneja instrufako.

A.- Tamen gravaj psikologiaj studoj kondukis al malkovroj, kiujn ni ne plu povas nekoni.

Cl.- La gramatika instruado ne plu devas okupi la unuan lokon en la lernolibroj. La aŭdo-vida instruado ĝin avantaĝe anstataŭas por doni al la lernantoj bonan prononcon, konvenajn lingvajn strukturajn refleksojn kaj riĉan vortaron.

A.- Eĉ se la instruado de esperanto ne okazas en lingvo-laboratorioj, tiu instru-tekniko devus inspiri la verkadon de la novaj lernolibroj.

Cl.- Konversacio devas okupi grandan lokon en la instruado de nia lingvo. Tiurilate ni salutis la pioniran laboron de Andrzej Pettyn kaj instigas la esperanto-instruantojn aĉeti la verkojn de nia pola samideano. *Novaj tendencoj en la instruado de esperanto*, Varsovio, 1955 kaj *Esperanto-konversacioj*, Varsovio, 1966.

A.- Por individuigi la instruadon la instru-tekniko programado estas granda pedagogia progreso. Ĝi ebligas sciencan gradigon de la stud-objektoj kaj ĝi malŝarĝas la instruantojn pri la peza tasko instrui, profite al pli altaj kaj dignaj funkcioj: konsili, helpi, gvidi la lernantojn.

Cl.- Sed programi kurson estas grandega laboro, kiu povas esti nur kolektive plenumata. Plie programita kurso devas esti severe elprovita antaŭ sia publikigo. Do ni povas antaŭvidi, ke bonaj programitaj kursoj de esperanto nur malrapide aperos sur la pedagogian merkaton.

A.- Tamen la tekniko pri programado ekzistas kaj ĝisfunde revoluciigas la sintenon de la instruistaro. Lernolibroj, kiuj longe ŝajnis bonaj, subite ne plu kongruas kun la pedagogia realeco.

Cl.- Ŝajnas al ni, ke hodiaŭ la instruado de esperanto devas plenumi kvar instruojn.

A.- Unue aŭdo-vida instruado devas sisteme kaj grade krei ĉe la studentoj bonajn refleksojn pri fonetiko kaj frazstrukturoj.

Cl.- Due programita kurso devas konduki la studenton al bona kompreno pri la esperanta vortfarado.

A.- Trie direktataj dialogoj devas gvidi la studentojn al preciza parolarto. Estas en tiu instrufako, ke la talento de la instruantoj ludas la plej gravan rolon.

Cl.- Kvare gradigita antologio metas la studentojn en kontakton kun nia historio kaj literaturo.

A.- En elementa kurso la du unuaj fakoj aŭdovida kaj programita instruoj ludas la plej gravan rolon. Tuj kiam la studentoj asimilis la bazajn strukturojn kaj regas la vortfaradon, tiam la du lastaj fakoj instruado per dialogoj kaj instruado per antologio okupos la ĉeflokon.

Reformo de la esperanto-instruado, 8-a parto
Claude Gacond, 183-a radioprelego, 1967.04.12 & 1967.04.15

Cl.- Testoj devos konstante kontroli la progresojn de la studentoj kaj alporti al la instruanto precizajn indikojn pri la lingvo-nivelo de ĉiu lernanto.

A.- Ĉar ni ne multe parolis pri tiuj testoj, ni finos nian prelegaron kun informoj pri ili. Ili povas esti plej diversaj. Ni prezentas specon, kiu ebligas en malmulte da tempo malkovri, kion devas ankoraŭ sisteme ekzercadi lernanto.

Cl.- La lernanto ricevas folion, kie li legas : *En ĉiu suba frazo-paro unu frazo estas korekta, la alia ne. Signu la korektan frazon.* Ekzemplo estas donita :

A.- *Baldaŭ venos mia patro. Baldaŭ venos mian patron.*

Cl.- Per kruco la lernanto devas indiki, kiun frazon li pensas korekta. Se li indikas *Baldaŭ venos mia patro* oni povas pensi, ke li asimilis la funkcion subjekto. Se li indikas *Baldaŭ venos mian patron* oni malkovras, ke li ne komprenis, ke *mia patro* estas la subjekto de *venos*, kaj oni donos al li ekzercojn pri tiu malfacilaĵo. Jen aliaj frazoj :

A.- *Paŭlo diras, ke sia patrino ne venos. Paŭlo diras, ke lia patrino ne venos.*

Cl.- Tiu demando ekzamenas, ĉu la testato kapablas uzi la posesivajn adjektivojn.

A.- *En la supo estas tri specoj da legomoj. En la supo estas tri specoj de legomoj.*

Cl.- Tiu demando ekzamenas, ĉu la testato kompreni la rolon de la prepozicioj *de* kaj *da*.

A.- *Eva estas pli lerta, ol sia fratino. Eva estas pli lerta, ol ŝia fratino.*

Cl.- Tiu demando revenas al la posesivaj adjektivoj, tikla gramatika punkto.

A.- *Dum ni manĝis la supon, iu demandis, ĉu ĝi estas bona. Dum ni manĝis la supon, iu petis, se ĝi estas bona.*

Cl.- La testo ekzamenas ĉi tie, ĉu la testato bone komprenis la signifojn de *demandi* kaj *peti*.

A.- *En 1920 Charlie Chaplin jam estis tre konita aktoro. En 1920 Charlie Chaplin jam estis tre konata aktoro.*

Cl.- La testo tuŝas la *ita-ata* –demandon.

A.- *Forĵetu la velkintajn florojn. Forĵetu la velkitajn florojn.*

Cl.- Jen demando jam pli malfacila. Kiel vi rimarkas, tiuj frazoj estas gradigitaj. La lernanto ricevos ekzercojn pri la unua eraro. Ĉiuj testoj faras proksimume la samajn demandojn. Kiam testato sukcesas la tutan teston, tiam oni povas averti lin, ke li estas preparata sukcese trapasi la elementan ekzamenon.

A.- Tiuj testoj povas esti uzataj en kursoj programitaj aŭ por la perkoresponda instruado. Oni eĉ povas antaŭvidi kajerojn, kiuj alportus la respondojn. Ili simple dirus : *Vi bone respondis* aŭ kontraŭe : *Vi eraras, jen kial.* Sekvus programita instruado kun gramatikaj klarigoj kaj multaj ekzercoj aŭtokorektaj.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-